

La akvociklo funkcias danke al la energio, kiun provizas la varmo de la suno.

La suno forvaporigas akvon el la oceanoj. Tiu nevidebla akvo-vaporo supreniras en la atmosfero, kie la aero estas pli malvarma.

La akvovaporo kondensiĝas en nuboj.

Vulkanoj produktas akvovaporon, kiu formas nubojn.

Aerfluo movas nubojn ĉirkaŭ la tuta planedo.

Akvogutoj formiĝas en nuboj, kaj poste falas al la Tero kiel precipitaĵo (pluvo kaj neĝo).

En malvarmaj klimatoj, la precipitaĵo amasiĝas kiel neĝo, glacio kaj glaciriveroj.

Neĝo povas fandiĝi kaj forflui en riverojn, oceanojn kaj teron.

Parto de la glacio iĝas rekte vaporo kaj iras en la aeron sen fandiĝi (sublimado).

Vi eble pensas ke ĉiu guto de pluvo, kiu falas el la ĉielo, aŭ ĉiu glaso da akvo, kiun vi trinkas, estas tute nova. Sed ĝi ĉiam estis ĉi tie kaj estas parto de la akvociklo.



Pluvo sur la tero forfluas malsupren, provizante akvon al lagoj, riveroj kaj oceanoj.

Ĉi tiu de la pluvo enfluas en la teron, kaj se ĝi iras sufiĉe profunden ĝi reŝargas la subteran akvon.

Akvo el lagoj kaj riveroj povas enflui en la teron.

Akvo iras en la teron pro gravito kaj premo.


Plantoj sorbas la akvon subteran kiu estas proksime de la tera surfaco.

Ĉi tiu de la subtera akvo fluas en riverojn kaj lagojn, kaj ankaŭ povas elflui ĉe la tera surfaco kiel akvofonto.

Plantoj sorbas subteran akvon per radikoj kaj el la folioj forvaporigas akvo.

Ĉi tiu de la subtera akvo iras tre profunden kaj restas tie dum longa tempo.

La subtera akvo fluas en la oceanojn, daŭrigante la funkcion de la akvociklo.



United Nations
International Year of
Water Cooperation